

Espéranto: vers une culture sociale sans frontières

Averto

La ĵus okazinta kongreso de SAT-Amikaro esprimis la deziron pri publikigo de la teksto, en kiu Henriko Masson klarigas sian eksiĝon el SAT kaj SAT-Amikaro. Tion ni nun faras, kompletigante la kvarpaĝan suplementon per elementoj, kiuj celas klarigi kelkajn el la miskomprenoj kaj disopiniecoj, kiuj provokis tiun ĉi bedaŭrindan retiriĝon. La celo tute ne estas nutri personan polemikon, sed malfermi debaton pri la celoj kaj rimedoj de poresperanta informado en laborista medio.

Avertissement

aux lecteurs francophones:

Le Service de Presse reparaitra à partir du mois prochain avec une équipe de rédaction renouvelée. Les textes du présent numéro expliquent les raisons de ce changement et donnent quelques éléments sur les directions futures. Pour en savoir plus... apprenez l'Espéranto!

Letero de H. Masson al la kongreso.

Karaj gekongresanoj, karaj gekamaradoj, karaj geamikoj,

Depost mia unua partopreno en kongreso de SAT-Amikaro, en Narbono, en 1972, mi unuafoje ne estas inter vi. En 1973, okaze de la kongreso de Laŭzano, mi ricevis iom abrupte la respondecon pri la informado. Tion mi plenumis dum 35 jaroj. Pliaj funkcioj aldoniĝis poste.

Ne sendolora estis por mi la decido komplete eksiĝi el la SAT-movado, des pli ke mi restas kore kaj intelekto ligita al la ideo, kiun mi faris al mi pri ĝi. Mi deziras jam danki al tiuj el vi, kiuj, post ekscio pri tio, malgraŭ la ŝoko, eĉ se malĝoje, volis nepre certigi al mi sian komprenemon kaj sian amikecon. Mia eksiĝo rezultis el sinsekvo da seniluziigoj. Ĝi okazis abrupte pro unuavide signifa malakordo, kiu certe ne pravigas en si mem tian decidon.

Kolizio okazis pro ilustraĵo proponita por la kovrilpaĝo de la decembra numero de **La SAGO**, sed, kompreneble, tio ne estis la nura afero pro kiu mi ne plu sentis min bone en la SAT-movado. Ankaŭ la interreta listo «SAT-diskuto» ne estis fremda al tiu seniluziigo. Ankaŭ teda kaj laciga, eĉ se ne ĉefe por mi, estis la finfine vana batalo por akiri apudsidejan butikon.

Pri la SAT-movado mi ĉiam havis ideon pri diverstendenca konverĝejo por malfermi al la laboristaro fenestron al la mondo. Mi ĉiam klopodis por ekvilibro de tendencoj en nia varbado. Pri mia sinteno, estis neniam riproĉoj de la ceteraj membroj de la Komitato aŭ malaprobo de la membraro. Esprimiĝis foje kelkaj opinioj laŭ kiu SAT-Amikaro estas «tro neŭtrala» (mi mem foje esprimiĝis favore al pli da

engaĝiteco), ke iuj el ĝiaj membroj estas «ne sufiĉe SAT-ecaj». Sed SAT-Amikaro kaj la ceteraj LEA-oj ne estas SAT. Ilia rolo estas tiu de rezervujoj, de antaŭĉambroj de SAT, kie esperantistoj povas laŭvole atendi antaŭ ol decidi aktivigi sine de SAT, aŭ simple nur resti. Aserti ke iu estas «nesufiĉe SAT-eca», tio estas ne fidi al ebla evoluo, kiu povas estiĝi nur se SAT mem kapablas montriĝi ideoriĉa, iniciatema, kreema, aktiva. Estas esence ke la SAT-movado ne fariĝu perceptebla de ekstere kiel nesteto de ekstremaj tendencoj.

De alia flanko, mi tro ofte aŭdis ke neŭtraluloj, por doni al novaj esperantistoj forpuŝan impreson pri SAT-Amikaro (kaj pri la SAT-movado ĝenerale), konsiderata de ili kiel konkurenca, diris ke ĝi estas «asocio de komunistoj kaj anarkiistoj». Nu, ne estas mallaŭdinde ke kunestas en la SAT-movado anarkiistoj kaj komunistoj. Male, anarkiismo kaj komunismo kontribuas al la ideo riĉeco de la Asocio kaj devas plue kunestadi konstrue en ĝi kun aliaj tendencoj jam ekzistantaj aŭ fondotaj, ekz. Sennaciista, liberpenso, socialista, ekologiista, pacista, feminista, europunia, k.a.. Plej maltrankviligis kaj nervozigis min la perspektivo pri pliaj kolizioj, la perspektivo ree forferi tempon kaj fortojn al interna batalo sine de la SAT-movado kontraŭ ekscesaj tendencoj, eble momente nur en la stato de ĝermoj, kiuj minacas ĝin. Estas tiom da bataloj farendaj ekstermovade ke mi ne havas emon defendi mian vidpunkton interne de ĝi. Ne malmultaj sin pretendantaj revoluciuloj pensigas min pri lokomotivo ne havanta alkrōsistemon por tiri vagonaron. La plej potenca lokomotivo estas en tiu kazo tute

senutila. Tiri popolon survoje al rifuzo de ĉio malhomeca ne eblas per malhomecaj principoj kaj metodoj. En tio, eĉ se ĝi vendiĝas, mi konsideras grave erara la produktadon de T-ĉemizoj kun portreto de Che Guevara kun dubinde humura aludo al la Cseh-metodo: mi ne speciale ŝatas la pastrojn sed agnoskas ke estas valoraj homoj ankaŭ inter ili, sed ambaŭ estis siamaniere pastroj, kaj unu havis sangon sur la manoj, eĉ de senkulpuloj, tute ne la alia. Tio estas strategio senperspektiva. Tendenco al radikaliĝo minacas la SAT-movadon je izoligo, plua regreso kaj malapero. Ne necesas multe da tempo kaj fortoj por detruu jardekojn da pacienca konstrua laboro kaj strebado. Purigoj ne malofte okazis ĉe revoluciuloj, kiuj pretendis sin pli «puraj» ol la ceteraj. Estas esence vekti la simpation de tuta popolo, ne de eta malplimulto, eĉ se aktiva.

Tio estis doloriga decido por mi, kaj mi konscias ke tio ĉagrenis, ĉagrenas kaj ĉagrenos multajn ge-amikojn, kiuj plene fidis kaj plue fidas je mi. Granda estas mia bedaŭro, sed dum kelkaj tagoj da hezito kaj reorganizado, mi ekkonsciis ke mi nun povas fari ion pli utilan por kaj per Esperanto. Mi dediĉis kaj, tiom longe kiom mi povos, mi plue dediĉos miajn fortojn, kiuj ne estas nun survoje al kreskado, esence al batalo kontraŭ eksteraj fortoj malamikaj al Esperanto kaj homeco. Mia laboro estos libere ekspluatebla de iu ajn aktivulo aŭ asocio, inkluzive de SAT-Amikaro kaj de SAT.

Fruktodonan kaj agrablan kongreson.

Henri Masson

Kien plu la informado?

Koncerne la malsamecon de konceptoj rilate informadon, ni represas ĉi sube ekstraktojn el teksto de 2003, kiu skizis la bazajn principojn de la por-esperanta fako de SAT, starigita en 2004 kun la celo, helpe de la daŭre funkcikapablaj LEA-oj, revigligi la por-SAT-an kaj poresperantan laboron direkte al laboristoj en la ceteraj mondopartoj. Tie estas reliefigitaj la limoj de la divido inter por- kaj peresperanta

laboro. Ankaŭ aperas argumentoj por klarigi, kial la ekzisto de esperanto-informado per argumentado diferenca de tiuj de la «neŭtraluloj» estas nepra kondiĉo por la pluvivo de memstara laborista esperanto-movado. Fine estas substrekitaj la dezirindeco de politika plurismo pri la esperanta propagando, same kiel pri aliaj temoj kadre de la SAT-movado.

1. La laŭstatuta rilato inter SAT kaj la LEA-oj

Alie ol UEA kaj ĝiaj landaj asocioj, SAT kaj la LEA-oj estas organize memstaraj unuoj, kies interrilatojn kaj labordividon regulas kontrakto el la jaro 1928, la Gotenburga Konvencio (GK). La GK antaŭvidas, ke la LEA-komitato aranĝu la kunlaboron inter la LEA-oj. Tio ne signifas distancigon inter SAT kaj la LEA-oj, sed nur ke regu taskodivido. La 1-a punkto de la GK tekstas: «Konsiderante, ke la nacilingvaj esperanto-asocioj kvazaŭ formas la rezervujon por la tutmonda esperanto-asocio (SAT), ĉiu laborista esperantisto klopodu, ke la interrilatoj estu la plej intimaj inter ambaŭ organizoj.»

2. Poresperanteco kaj peresperanteco

La taskodivido baziĝas sur la principa distingo inter «peresperanteco» kaj «poresperanteco», laŭ kiu SAT estas «peresperanta», t.e. aplikanta Esperanton por politikaj celoj senrilataj al tiuj de la Esperanto-movado, dum la LEA-oj estas «poresperantaj», t.e. taskitaj disvastigi Esperanton en la laborista kaj klasbatala medioj de siaj respektivaj landoj aŭ lingvoregionoj. La 2a punkto de la GK preskribas: «Ĉar la taskoj inter ambaŭ organizoj estas malsamaj, necesas, por eviti konfliktojn, ke SAT principe plenumu la taskon de peresperanta laboro, kaj la landaj asocioj principe tiun de poresperanta laboro.»

Sed tiu dudivido inter peresperantaj kaj poresperantaj agadoj estas pro du kialoj tute malsimpla:

1) Pro organizaj kialoj kaj SAT kaj la LEA-oj eĉ en ideala situacio neniel povus eviti taskojn kaj agadojn el la kategorio, por kiu ili ne «kompetentas». Ekzemple, la LEA-oj en siaj gazetoj kaj renkontiĝoj

ne povas dediĉi sin al celkonforma ekstera informado kaj Esperanto-instruado sen publike vidigi en ili la «peresperantaj» politikajn celojn de la SAT-medio kiel tuto. SAT aliflanke, kiam ĝi rilatas kun neesperantistaj politikaj medioj okaze de internaciaj manifestacioj, renkontiĝoj kaj forumoj, neeviteble bezonas informi per naciaj lingvoj pri Esperanto.

2) Ekzistas granda grupo de «hibridaj» taskoj kaj agadoj, en kiuj la «poresperanteco» kaj la «peresperanteco» estas nedisigeble kunnoditaj. La «peresperanta» SAT-kongreso prave estas uzata kiel


okazo por informi la publikon de la kongresloko pri Esperanto. Aliflanke, la nacilingva Esperanto-informado ne estas pure «poresperanta» afero, sed neeviteble transportas politikan mondrigardon, per kiu oni pravigas Esperanton kaj Esperanto-agadon. Difini la politikan enhavon de Esperanto-informiloj estas grava «peresperanta», t.e. ĝeneralpolitika tasko.

Ŝajne oni ekrimarkis la malsimplecon jam en 1928, ĉar en la supre citita frazo el la GK estas dirite dufoje «principe». La GK antaŭvidas kiel partan problemsolvon, ke «en ĉiu LEA-grupo ekzistu SAT-rondo, kiu plenumu la peresperantan



Precizigo de la Eldona Fako Kooperativa de SAT

Responde al la teksto de H.M., la eldonkooperativa fako de SAT, kiu produktis la CHE-metodan T-ĉemizon rimarkigas, ke ĝi samtempe eldonis libron



pri Mortopuno, en kiu estas sufiĉe klare argumentite, ke tiu ĉi «nehoma rimedo» ne estas oportuna eĉ por starigo de senekspluatita sociordo. La eldono de la menciita T-

ĉemizo do ne estu misinterpretita kiel subteno al tiuj «nehomaj principoj». Krome, la kooperativo produktis samtempe alian ĉemizon pri internacia solidareco, kaj ambaŭ estas surbude prezentitaj ankaŭ kun «neŭtralaj» T-ĉemizoj, sloganante ekzemple pri «esperanto, lingvo de Antarkto», «esperanto, jes volonte», kaj baldaŭ tiuj produktitaj de «Réinsertion et Espéranto».

Do, ĝi ankaŭ tute ne celas trudi unutendecan dev-igan propagandmetodon al aliopiniantaj kamaradoj.



La Ĉe-metodo

kaj por SAT-an laboron en la kadro de la grupo». En la ŝrumpintaj LEA-oj de la nuntempo tiaj organizaj subdividoj estas kompreneble ĥimero.

Entute, la LEA-oj dravis multe pli en la direkto de «poresperanta», t.e. ĝeneralpolitika agado, ol eblis antaŭvidi komence de la 20-a jarcento. La preskaŭ tute Esperantlingvaj, politik-tamaj organoj de multaj LEA-oj montras tion. La neglekto de «poresperanta» laboro okazis parte pro la malkresko kaj malvigligo de multaj LEA-oj. Plia neglektokialo estas la malfacilo ĉe LEA-oj difini precize la celgrupon de sia Esperanto-informado post la malfortiĝo de la laborista movado kiel memstara politika kaj socia faktoro en multaj landoj. Laste, malklariĝis la politikaj dividlinioj inter la SAT-medio kaj la t.n. «neŭtrala» medio, kaj tio kreskigas la pretecon de individuaj LEA-anoj akcepti kaj mem partopreni la «poresperantan» laboron de la «neŭtralaj» asocioj.

SAT siaflanke komencis lastatempe fari pli da «poresperanta» laboro, ĉar unu el la plej gravaj amaskomunikiloj, per kiuj oni informas pri Esperanto, ignoras landlimojn: la interreto. SAT ekokupiĝas pri nacilingva informado en la interreto, kaj ĝia informa oferto atingas publikon en tiu parto de la mondo, en kiu ne estas LEA-oj - kaj tio estas la plej granda parto de la mondo.

3. Stato de la LEA-oj

La LEA-oj estas tre diverse fortaj. Dum kelkaj (unuavice SAT-Amikaro kaj SATEH) plu estas fortaj kaj viglaj, aliaj spertis zorgigan ekdormon dum la lastaj jaroj.

Oni memoru, ke en malgrandaj LEA-oj la pure asociaj taskoj (estrarelektoj, serĉado de kandidatoj, membroadministrado, laŭbezona ŝanĝado de la statuto kaj eldonado de organo) sorbas multe da laborforto, kiu sekve ekmanas por la plenumado de la kernaj taskoj de LEA - dum la agadoj kaj aktivuloj ne sufiĉe multas por vere postuli tiom da organiza komplikeco. Eblas facile pretervidi ĉi tiun problemon de misaplikata laborforto, ĉar asocioj kun impona fasado kaj malriĉa interno estas tipa fenomeno ankaŭ aliloke en la esperantista mondeto.

4. La kadukiĝo de LEA-oj damaĝas la tutan SAT-medion

La iompostioma endormiĝo kaj formorto de LEA-oj ne povas ne esti fonto de malkuraĝiĝo en SAT, kiel

observite ĉe la malapero de FLE el la familio de LEA-oj. Ĝia malapero okazis tiel, ke ĝi iĝis laborgrupo ene de Esperanto Nederland. Tiu fakto devus sproni SAT al agado celanta provizi al ne vivipovaj LEA-oj alian problemsolvon ol la kunfandiĝon kun la «neŭtraluloj». La problemsolvo povus esti laŭ mi la kunlaborigo de la restantaj membroj en tutmonde bazita «universala LEA».

La malaperon de iu ajn LEA neeviteble rimarkas fortoj ekster SAT, kiuj ne povas taksu ĝin alie ol kiel signon de kadukiĝo. Homoj el la «neŭtrala» movado povas taksu tian okazaĵon «pruvo» pri la superflueco de ia ajn alternativa, precipe maldekstra poresperanta laboro. Eĉ eksteruloj sen malico kontraŭ SAT neeviteble interpretas tian aferon laŭ neavantaĝa por ni maniero.

La kadukiĝo de LEA-oj devas nutri la supozon, ke SAT-membroj ĝenerale kontentas pri la Esperanto-informado plenumata en la UEA-medio kaj pro tio ne vidas bezonon teni strukturojn vivaj, kiuj kapablas kontraŭstarigi al ĝi SAT-specifan, politike alternativan Esperanto-informadon. Observantoj devos konkludi, ke la lingvopolitika «mesaĝo» de SAT al la ekstera mondo estas samsubstanca kiel la «mesaĝo» de UEA, kaj tio siavice nutros seriozajn dubojn pri la ĝeneralpolitika profilo kaj entute pri la bezonateco de SAT.

5. Neglekti la Esperanto-informadon signifas forcedi gravan agadokampon

Lanti kritikis la varbadon de «t.n. neŭtralaj esperantistoj». Parolante pri la «t.n. neŭtralaj grupoj», li konstatis:

«Tie ĉiu esperantisto, ĉu revoluciulo, ĉu 'bona patrioto', pagas kotizon. Ĉu por propagandi senescepte en ĉiuj medioj? Tute ne. La propagandiloj estas tiele verkataj, ke ili estas varbpovaj nur en konservativaj rondoj. Sekve la propagando en revoluciaj medioj malsanas dum ĝi sufiĉe bonfartas alie.»

Akravida rigardo al la UEA-medio montras, ke tiu aferstato iomete ŝanĝiĝis, sed nur iomete kaj ne principe. La Esperanto-informadon de influaj instancoj kiel la Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) kaj la Komunikadcentro en Bruselo nuntempe ne dominas klasike konservativaj motivoj, sed alvokoj al etnofilia diferencismo kaj pli modernaspekta, eŭropa

naciemo. Regas tie la linio - preskaŭ neprikontestata de la membroj - laŭ kiu Esperanto devas servi la aferon de savado de malaperantaj etnoj kaj etnaj lingvoj. Esperantistoj de la «neŭtrala» medio ofte analizas la politikajn kontraŭdirojn de la mondo laŭ maniero, kiu etnizas ilin. Eblas vortigi tian pensadon tiel, ke ĝi ŝajnas maldekstra, kaj tion la «neŭtrala» medio faras, kiam tio taŭgas por ĝiaj celoj.

Se neniu plenumos alternativan publikan informadon, kiu distanciĝos de tiaj ideoj aŭ almenaŭ elstarigos aliajn - sociegalismajn - motivojn, tiam regos unu tagon nova, ne plu universalisma, sed etnoplurisma «interna ideo» de Esperanto. Se ne SAT-anoj la unuaj prilaboros Esperanto-informadon bazitan sur alternativaj socipolitikaj motivoj, kiu do faros tion?

Kiam necesas plenumi informadan laboron en maldekstra medio, la modelaj informiloj (kiom ili entute ekzistas) ne troviĝas je facila dispono. Sekve, oni prenas informilojn el la «neŭtrala» medio kiel modelojn, imitas la bazan argumentadon kaj ŝminkas la enhavon ruĝeta per enplektado de kelkaj «progresivaj» vortumoj.

Jen kial, laŭ mi, la vortoj de Lanti pri informiloj plu validas. Mi tamen ne volas sugesti, ke maldekstra Esperanto-informado emfazu unuavice la kontraŭnaciisman motivon, kaj mi ne malagnoskas la meritojn, kiujn la informa laboro de la «neŭtrala» medio ja ankaŭ havas - ekster la kampo de la socipolitika apologio de Esperanto. Devas ekzisti forumo por la gekamaradoj, kiuj volas okupiĝi pri nacilingva Esperanto-informado kun SAT-specifa politika enhavo, interŝanĝante kaj opiniojn kaj laborrezultojn.

6. Poresperanta fako

Mi proponas la kreon de interret-bazita grupo, kiu okupiĝos pri la «poresperanta» laboro en laboristaj, sindikataj, progresivaj, maldekstraj, emancipcelaj ktp. medioj. Tia grupo agadus tutmonde, prioritare tie, kie neniu LEA ekzistas. Ĝi devus esti kiel la LEA-oj malfermita ankaŭ al nemembroj de SAT, kaj kiom eble iĝi rekrutejo de novaj SAT-membroj. Ĝiaj taskoj inkluzivus nacilingvan informadon, kreadon de nacilingvaj enhavoj por la SAT-TTT-ejo, instruadon de Esperanto - kiom bezonata kaj per la interreto ebla - kaj kontaktotendadon kun novaj

esperantistoj, kiuj orientiĝas politike en nia direkto kaj pri kiuj neniu el la nunaj LEA oj povas zorgi.

Esence temas pri ia «universala LEA», kiu agadus laŭ siaj fortoj tie, kie nun neniu LEA ekzistas aŭ agadas. Ĝi devus laŭ mi havi la statuson de LEA kaj partopreni en la LEA-Komitato.

Kroma avantaĝo estus, ke SAT montrus al si mem kaj al la cetera esperantista komunumo, ke ĝi kapablas trovi modernan komplementon de la tradiciaj LEA-oj kaj strukturmodelon kapablan postsekvi tiujn LEA-ojn, kiuj malhavas la forton pludaŭri. Estus bonege neŭtraligi la negativan propagandan efikon de la antaŭvideblaj kadukiĝoj kaj malapero de kelkaj LEA-oj.

7. Ĉiutendenceco

La Poresperanta Fako devas esti malfermita – kiel SAT mem – al larĝa spektro de progresivaj esperantistoj. La eventuala reta dissendolisto kaj la TTT-ejo devas aktive klopodi pri politika plureco kaj disponigi lokon por ĉiuj informadaj konceptoj kun iliaj malsamaj politikaj fonoj. Ĝi devus faciligi la intersanĝon inter informlaborantoj kaj ne alstrebi «unuecan publikan bildon».

Miaj personaj opinioj pri Esperanto-informado, kiuj esprimiĝas precipe en parto 5 de ĉi tiu teksto, ne estu miskomprenitaj do kiel propono de «linio», kiun la tuta agado devus sekvi.

8. Perspektivo

La agado de la Poresperanta Fako povus helpi realigi la celojn :

a) varbi novajn progresivajn esperantistojn kaj ligi ilin dekomence al SAT,

b) korekti la ekvilibron inter «per-esperanta» kaj «poresperanta» laboro en la SAT-medio favore al agadenhavo, kiuj kombinas ambaŭ,

c) altigi per donado de pozitiva ekzemplo la kvaliton de la ĝenerala Esperanto-informado, ankaŭ ekster SAT; ĉar tiu informado en la «neŭtrala» medio englitis en etnoplurisman/naciisman radspuron, el kiu ĝi jam ne facile eltiros sin sen ekstera helpo,

ĉ) altigi en la esperantista medio la prestiĝon de SAT, montrante en loko tre eksponita al la ekstera vido ĝian kapablon adaptiĝi kaj modernigi.

Laŭ teksto de **Gary Mickle**, originale publikigita en 2003

kaj rete legebla en kompleta versio ĉe: <http://www.satesperanto.org/Integrita-retbazita-medio-de.html>



kial, diable, neniu venas al mi ?



Ĉi tiu teksto, kompilita iom urĝe, tute ne pretendas liveri plenan kaj definitivan veron pri la demando, kaj nur celas esti instigilo al plua diskutado. La kolumnoj de la SAGO estas malfermitaj al eventualaj rebatemuloj, kaj la daŭrigo de la franclingva informilo estos maniero nutri la teoriantan debaton per praktikaj ekzemploj. Ankaŭ tiurilate bonvenas proponoj kaj kontribuoj.

Cours par correspondance d'espéranto : inscripion directe aupres de : Marcel Redon, 52 Grande Rue, 57365 Flevy. Tel. : 03 87 73 95 57

Service Librairie par correspondance pour les adherents (catalogue sur demande) Au siĝe : 132/134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris

SATamikaro en :

FRANCE : 132/134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris

BELGIQUE : Esperanto-Infor, Rue du Loutrier, 14, BE-1170 Bruxelles. Tel. 02/6608591

SUISSE : Mireille Grosjean, Grand-rue 9, CH-2416 Les Brenets.

LA SAGO. CPPAP n° 0307 G 86224.

Directeur de la Publication : Guy Cavallier.

Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Senart.

LA SAGO - fevrier 2008.

Esperanto

vers une culture sociale sans frontieres